

& La oreloj de la leporo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 290 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por La plej granda kulpulo.>

(#Melodio:

<:29> (/La dolre mi mi mire fare mi do; do reldo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 La leonon vundis besto korna. ; Li
o2rdonis en kolero morna:

(×; **Venu mastrino en la2 ĉen' ;
Prenu mian manon en firma ten'.**)

'2 "Ĉiu best' havanta korn-armilon ; iru
el la regno en ekzilon!"

'3 Do elmigris cervo, kapreolo, ; kapro,
ŝafo, ĉamo, kaj, ĉe kolo

'4 la orelojn longajn kuŝiginte, ; por ke
tiuj ne elstaru pinte,

'5 (iris en ekzilon — la leporo. ;)×

'6 La sciuro miris: "He, bapitano! ; Kien
do vi iras?" "Al lontano."

'7 "Kial?" "Pro la kornoj." "Ho, ĉieloj! ;
Tiuj longaj estas ja oreloj!"

'8 La leporo diris: "Ĉu por tio ; povas
esti ia garantio,

'9 ke ne nomos iu el kaprico, ;
favorĉaso, strebo aŭ malico

'10 la orelon longan longa korno? ; Tie
ĉi evitus min la dormo."